

FELIETONO

La Suferoj de juna Werther

de W. v. GOETHE

Trad. F. USINGER

La 19-an de aprilo.

Dankon por viaj du leteroj. Mi ne respondis, ĉar mi re-
tenis tiun ĉi folion (!), ĝis kiam mia eksigo de la kortego alve-
nis; mi timis, ke mia patrino sin turnos al la ministro kaj
malfaciligos al mi mian intencon. Sed nun okazis, mia eksigo
alvenis. Mi ne deziras diri al vi, kion malvolonte oni donis
ĝin al mi kaj kion la ministro skribis al mi; vi eklamentus
denove. La prinĉeredonto je la eksigo sendis al mi dukek-
kvin dukatojn kun parolo, kiu tuŝis min je larmoj; do mi ne
bezonas de la patrino la monon, pri kiu mi skribetis antaŭ
nelonge.

La 5-an de majo.

Morgaŭ mi foriros de tie ĉi kaj, ĉar mia naskiĝloko kuŝas
nur ses mejlojn de la vojo, mi deziras ankaŭ ĝin revidi, de-
ziras rememori la malnovajn, feliĉe traravitajn tagojn. Ĝuste
tra tiun pordon mi eniros, tra kiu mia patrino kun mi elve-
turis, forlasante la intimajn ejojn post la morto de mia
patro por enkaĝigi sin en urbon netolereblan. Adiaŭ, Vil-
helmo, vi aŭdos pri mia iro.

La 9-an de majo.

Mi finis la migradon al mia naskiĝejo kun ĉia pieco de pli-
grimanto, kaj multaj neatenditaj sentoj min tuŝis. Apud la
granda tillo, kiu staras kvaronhoron de la urbo al S..., mi
haltigis, eliris kaj igis la poŝiston forveturi por piedirante
ĝui ĉiun memoron tute nove, vive, laŭ mia koro. Jen mi
staris sub la tillo, kiu antaŭe, kiam ĝi estis knabo, estis
celo kaj limo de miaj promenadoj. Kiel malsame! Tiam
en mia feliĉa malklereco mi deziris eliri en la nekonian
mondon, kie mi esperis por mia koro tiom da nutraĵo, tiom
da ĝuo, por pleniĝi kaj kontentiĝi mian celantan, sopran-
bruston. Nun mi revenas el la vasta mondo — ho amiko
mia, kun kion da disbatitaj esperoj, kun kion da detruitaj
intencoj! Mi vidis la montaron kuŝantan antaŭ mi, kio
milfoje estis la objekto de miaj deziroj. Horojn mi povis
sidadi tie kaj deziregi, ke mi estu transe, kun intima animo
perdiĝi en la arbaroj, la valoj, kiuj prezentis sin al miaj oku-
loj tiel amike krepuŝkantaĵ; kaj kiam mi devis reiri je fik-
sita tempo, kun kia indigno mi forlasis la lokon karan! —
Mi pliproksimiĝis al la urbo; ĉiuj malnovaj konitaj ĝar-
dendometoj estis salutataj de mi, la novaj estis antipatiaj al
mi, kiel ankaŭ la ŝanĝoj krome faritaj. Mi eniris la pordegon,
kaj tamen retrovis bone la vojon. Karulo, mi ne volas de-
taile priskribi; tiom ĉarme kion mi troviĝis, tiom unuforma
farigis la rakonto. Mi decidis loĝi apud la foirejo, ĝuste
flanke de mia malnova domo. Alirante mi rimarkis, ke la
lerneja ĉambro, kie honesta maljunulo amasigis sin infan-
tecon, la larnojn, la pezecon de l'animio, la korimon, kiujn
mi eltenis en la ĉambraco. — Mi faris nenian paŝon, kiu ne
estis rimarkinda. Pilgrimanto en la sankta lando ne trovas
tiom da lokoj de religiaj memoroj kaj lia animo apenaŭ estas
tiel plena je sankta emocio. — Ankoraŭ unu por mi! Mi iris

(1) t. e. la letero de la 24-a. de marto. Rim. de la Trad.

mal-supren de la rivero ĝis ia farmobieno; tio altempe ankaŭ
estis mia vojo, kaj la ejoj, kie ni knaboj ekzercis nin naski
plej multe da saltoĵ de plataj ŝtonoj en la akvo. Mi tiom
vigle memoras, kun kiel mirindaj supozoj mi, iafoje starante
kaj rigardante, sekvis la akvon, kiel aventuraj mi prezentis
al mi la regionojn, kien ĝi nun fluos, kaj kiel baldaŭ mi tro-
vis tie limojn de mia fantazio; kaj tamen ĝi devis flui pli
malproksimen, ĉiam pli malproksimen, ĝis kiam mi tute
perdiĝis en la rigardado de nevidebla malproksimeco. —
Vidu, karulo, tiel limigitaj kaj tiel feliĉaj estis la majestaj
prauloj! Se Ulrso parolas pri la nemezurita maro kaj pri
la senfina tero, tio estas tiel vera, homa, intima, malvasta
kaj sekreta. Kion utilas, ke ni nun povas paroli kun ĉiu ler-
nanta knabo, ke ĝi estas ronda? La homo nur bezonas mal-
multajn terbutlojn por ĝui tie, pli malmultajn por sube
ripozi.

Nun mi estas tie ĉi en la princa ĉaskastelo. Oni ankoraŭ
povas tute bone vivi kun la sinjoro, li estas verema kaj
simpla. Strangaj homoj estas ĉirkaŭ li, kiujn mi neniel kom-
prenas. Ili ne ŝajnas esti fruponoj kaj tamen ne aspektas
kiel honestaj homoj. Kelkfoje ili ŝajnas al mi honestaj kaj
tamen mi ne povas fidi al ili. Kio plue ĉagrenas min, estas,
ke li ofte parolas pri aferoj, kiujn li nun aŭdis kaj legis, kaj
ĝuste de tiu vidpunkto, kiel la alia prezentis tiin.

Ankaŭ li ŝatas miajn prudenton kaj talentojn pli ol tiun ĉi
koron, kiu tamen estas mia sola fiero, kiu sola estas la fonto
de ĉio, de ĉu forto, ĉiu feliĉego kaj de ĉiu mizero. Ha, kion
sciās mi, povas scii ĉiu, mian koron havas mi sola.

La 25-an de majo.

Mi havis ion farotan, pri kiu mi volis nenion diri al vi, ĝis
kiam ĝi estos plenumita: nun, kiam ĝi ne realiĝas, estas
same bone. Mi intencis iri en la mision; tio longtempe tenis
mian koron. Tial precipe mi sekvis la princon ĉi tien, kiu
estas generalo en la servo de... Promeneante mi malkovris
al li mian intencon; li malkonsilis de ĝi, kaj ĝi estus pli mia
pasio ol ĥimero, se mi ne aŭskultus lin.

La 14-an de junio.

Diru kion ajn vi deziras, mi ne povas plu restadi. Kio
estas mia tasko ĉi tie? Mi enuas. La princo zorgas pri mi
kiel eble plej bone, kaj tamen mi ne estas en konvenaj
kondiĉoj. Funde mi havas nenion komunan. Li estas sprita,
sed tute ordinara viro; lia ankaro ne amuzas min pli ol se
mi legas boustilan libron. Ankoraŭ semajnon mi restos kaj
tiam ree vagos. La plej bona, kion mi faris tie ĉi, estas mia
desegnado. La princo sentas en la artu, kaj sentus pli an-
korau, se li ne estus limigata per la abomena sciencia karak-
tero kaj per la laŭregula terminaro. Kelkfoje mi grincigas
dentojn, kiam mi kondukas lin kun viva fantazio al naturo
kaj artu kaj li per unu fojo pensas esti prava, se li interrom-
pacas per stampita fake esprimo.

La 16-an de junio.

Jes certe, mi estas nur migranto, pilgrimanto sur la tero!
Ĉu ne ankaŭ vi?

La 18-an de junio.

Kien mi iros? Tion mi malkovru diskrete al vi. Du semaj-
nojn mi ankoraŭ devas restadi ĉi tie kaj tiam, mi imagis, ke
mi vizitos la minojn en...; sed tute ne estas verajo, mi nur
deziras pli proksimen al Ĥanjo: jen ĉio. Kaj mi ridas pri
mia propra koro — kaj faros laŭ ĝia deziro.

(Dairigola).

◦ ESPERANTISMO ◦

AL NIA LEGANTARO

Ni rememorigas al niuj legantoj, ke ni deziras la kunlaboradon de kiel eble plej multaj samideanoj por la redakto de la rubriko « Esperantismo ». Ne necese estas skribi leterojn : plej ofte sufiĉas poŝtkarto. Ni plezure entreprenos ĉiujn informojn pri nia movado, sed kompreneble ni devos kelkfoje resumi, ĉar mankas al ni loko. Ni rekomendus al helpantoj la precizecon ; ili devolu indiki la daton de ĉiu fakto (parolado, kurso, k. t. p.), la devenon de ĉiu informo. Por artikoloj en naciaj ĵurnaloj oni sendu al ni, se ne la ĵurnalon mem, almenaŭ ĝian titolon kaj daton, la nomon de la urbo, kie ĝi aperas, kaj resuman enhavon de l'artikolo. Plue, kiam komitato organizas nacian aŭ provincan kongreson aŭ eĉ feston iom gravan, estas konsilinde konigi al nia redakcio kiel eble plej frue la daton kaj programon de tiu okazontaĵo. Tiel reklamo ne estas vana por la sukceso. Senutile diri, ke ni poste danke ricevos iom detalan raporton pri tiuj manifestadoj de nia vivado. Ĉiuj korespondantoj devas alveni antaŭ la 12a kaj 27a de ĉiu monato al la adreso : « Esperanto », rue de la Bourse, 10, Genève, Svislando.

KRONIKO

Novaj grupoj kaj societoj. — En *Capodistria* (Istrio, Aŭstrio) oni formis komitaton por la propagando de Esperanto kaj U. E. A. en tiu regiono — P.

En *Berlin*, la Esperanto-Gruparo fondita la 23 jan. kunigis krom du l'berstudentaj sektejoj, ĉiujn 16 grupojn nun ekzistantajn en Berlin kaj ĉirkaŭaĵo. Prez. : S-ro adv. Schiff. — O. F.

En *Romans* kaj *Bourg* (Franc.), societo « Bona Stelo ». — R. kaj B. P.

En *Spa* (Belgio), fondiĝis grupo kun pli ol 100 membroj. Tiu rezultato estas ŝuldata al la vigilaj klopodoj de Sino Biske, ĉar antaŭ kelkaj monatoj, Esperanto estis tie tute ne konata.

En *Göttingen* (German.), unuigo « Espero ». — G. E.

En *Wongrowitz* (German.), fondita de S-ro P. Theel. — G. E.

En *Berlin*, katolika societo; prez. : S-ro Fromm. — F.

Novaj kursoj. — En *Corrigliano* (Ligurio, Ital.), ĉe la urbaj lernejoj nova kurso de S-ro Schmucker, de la Liguria Esp. Instituto. — S.

En *Genova* (Ital.) novaj kursoj ĉe la urbaj lernejoj, sub la aŭspicioj de la Liguria Instituto. — S.

En *Borgo* (Finnl.), du kursoj kun 60 partoprenantoj : unu por Finnaj (Fino Loenberg kaj S-ro Soldan); alia por Svedoj (Fino Andersen kaj S-ro Wahlbeck). — W. W.

En *Bourg-de-Péage* (Franc.), ĉe la unuagrada supera lernejo. — P.

En *Szabakca* (Hungarl.), gvidata de Fino de Zarag, instruistino. — Z.

En *Zolkiew* (Galicio, Aŭstrio) post propaganda vespero. — E. H.

En *Ufa* (Rusujo) kun 40 lernantoj, S-ro V. V. Zavyalov. — F.

Francujo : la Burgonja Federacio ĵus prezis aŭson kun listo de la kursoj en jenaj urboj : *Autun, Auxerre, (5), Auxey-le-Grand, Beaune (5), Bourg (4), Chalon-sur-Saône, Le Creusot (2), La Crost, Dijon, (3), Lons-le-Saunier, Lons-le-Vaucou, Meursault, Pont-de-Vaux, Saint-Germain-du-Bois, Saint-Nicolas-les-Cîteaux, Saigny-les-Beaune (4), Tonner (3).*

Germanujo : en *Bad-Reichenhall, Ludwigshafen* (supera), *Charlottenburg (2), Werdau, Esslingen, Bamberg* (supera), *Berlin (3), Breslau (4), Einbeck, Elberfeld, Erlangen, Godesberg, Hamburg (3), Kattowitz O.-S., Kolmar i. E., Lübeck, Petite, St.-Ingbert, Tilsit* (supera). — G. E.

Kunveno kaj festoj. — En *Trieste* (Aŭstrio), la 13. januaro, festeno de la « Rondo Esperanta ». Kanto, deklamoj, danco. — P.

En *Barrow in Furness* (Angl.), 5 jan., oka jarfesteno de la Esp. Societo. Koncerto parte Angla, parte esperanta. Ĉeestis 52 personoj. Neesperantistoj petis pri ripetado. — W. H. S.

En *Rotterdam* (Nederl.), la 7 jan., unua jarkunveno de la laborista klubo « L'Espero... » Sukceso promesplena por la estonto. — F. P.

En *Bordighera* (Ital.), 6 jan., ĉiujara festeno por interrilatigi la Esp.-istojn de la Riviera. Estis reprezentataj 7 nacioj. La proksima kunveno okazos en Nice. — D.

La grupo en *Roanne* (Franc.), la 7 jan., reelektis sian komitaton. Prezidanto : S-ro instruisto A. Paire ; Sekretario : S-ro L. Maillet, Stenografisto, 88, rue du Commerce. — M.

En *Santa Coloma de Farnès* (Hispan.), 7 jan., festeno de la grupo. 30 partoprenantoj ; multaj paroladoj, inter kiuj ĉe la unbestro. Bona propaganda rezultato. — V. L.

En *Samos* (Turkujo), la 22 jan., jara balo de la « Samosa Esperanto-Societg », sub la patronado de la Geprincaj Moŝtoj de la insulo. — S.

En *Genova* (Ital.), la 17 dec., Zamenhola datreveno festita de la ĝenova Unuigo kun ĉeesto de aĥsocietanoj kaj de jurnistoj. — S.

En *Göttingen* (German.), 4 febr., propaganda vespero, en kiu ĉeestis 20 samideanoj el Braunschweig, Hanover, Kassel, Einbeck. Parolado de S-ro Reinking, ekspoziciejo « Göttinger Tageblatt » tre fervore kaj detale raportis pri tiu manifesteno. Novan kurson gvidas S-ro H. Steinberg. — S.

En *Spa* (Belgio), Sukcesplena festo la 14 de jan., koncerto, kantoj ; en dua parto paroladis S-ro Mathieux (Bruselo) kun lumblidoj pri Esperanto kaj Esperantismo.

En *Ufa* (Rusujo), 17-18 jan., ekspoziciejo el la kolekto N. Foss. : 100 libroj, specimeno de 87 gazetoj, preskaŭ 700 P. k., el ĉiuj landoj, reklamoj, dokumentoj ĉiuspecaj, k. t. p. Pli ol 200 vizitantoj, el kiuj multaj fariĝis adeptoj. Multe da ĉeleĉaj ŝlosiloj disdonitaj. Favore raportis la gazeto « Ufimskij Vestnik ». — F.

Paroladoj. — En *Londono*, S-ro P. Blaise, ĉe la Emma-nuel Club, pri U. E. A. — B.

En *Zolkien* (Galicio, Aŭstrio), S-roj S. Lazica kaj W. Giercuskiewicz, el Lodz, aranĝis propagandan vesperon en la ejo de la pola Societo « Sokol », la 28 jan. — E. H.

Paroladvojaĝo Privat. — Nia komitatano kaj kunlaboranto Privat faris novan sukcesan serion de paroladoj en Germanujo, Rusujo kaj Aŭstrio.

S-ro Privat sinsekve paroladis en *Dresden* (9 jan.), *Breslau, Krakow, Leov, Ĥarkov* (en fermita kunveno, ĉar nur tia estis permesita), *Moskvo* (koncert-parolado antaŭ pli ol 1.000 personoj). *Peterburgo* (fermita kunveno), *Varsovio* (fermita kunveno kun la ĉeesto de D-ro Zamenhof, kiu varme dankis la paroladinton kaj instigis al multopa veturado Ĥrakovon) *Vieno, Budapeŝto*. En *Peterburgo* S-ro Privat vizitis ĉefministron de Rusa Imperio, S-ron Kokovzov, laŭ la petoj de Moskvaj kaj Peterburgaj Esperantistoj, kiujn oni ĉie malsupas pro la Postnikova afero. La ĉefministro de Rusujo certigis, ke neniel oni rajtas kulpigi la Esperantan movadon pro la afero Postnikova, kiu al Esperanto tute ne rilatas. Li diris, ke rusaj Esperantistoj povos re-fondi la « dissolvitajn » grupojn elektante taŭgan intertraktanton inter ili kaj la rusa registaro.

Estas superflue atentiĝi pri la graveco de tiu vizito por niaj rusaj samideanoj.

Pro manko de loko ni kompreneble ne povas detale raportiti pri ĉiu parolado ; pro la sama kaŭzo ni ne povas represii la

ofte longajn raportojn, kiujn ni ricevis de entuziasmiglitaj samideanoj. Ni nur citos kelkajn liniojn el unu el ili.

« S-ro Privat prezentis al la publiko longan, belan, senegalan parolon, kin estis plena je sagaj alegorioj, spritaj komparoj, interesaj faktoj el lia vojaĝo, ktp. La ĉefi penso de lia flua, ĉarma parolo estis Esperantio, kun ĝia bona organizo kaj servoj. Ĝi ja estas tiu bela idealo, pro kiu ni batalas, kvintesenco de la tuta nia afero !

S-ro Privat ĉiam akcentis, ke la lingvo vivas en sia uzado, ke ĉe ĉiutage uzado de la lingvo estas pli grava, ol multaj bonaj paroloj. Bedaŭrinde tiun maloftan, ĝojigan parolon oni ne povas prezenti ĉi tie ĉe konekte, ĉar ĝi estis tiel ampleksa, multkolora, diversepensita : jen vian oreton karessas belaj vortoj pri humaneco, pri idealoj de homaro, jen konvinkantaj faktoj el vivo de Esperantio iusligas vin tuj kaj ĉiam resti ĝia fidela ano, jen iu alia ero de la parolo plenigas vian koron je plej bonaj sentoj.

Paroladvojaĝo Parish. — La 18-an de jan. en *Le Locle* (Svisl.) organizita, en la urba teatro, de la loka Delegito kun la helpo de la Kinematografio « Central » kin prenis ĉiujn elpezojn sur sin. S-ro Parish parolis dufoje posttagmeze al la infanoj. Ĉeestis 700 la unuan fojon kaj 200 duan. La enirbiletoj (fr. 0.20) estis venditaj en la lernejoj kun permeso de samideano S-ro A. P. Dubois, Lernejdirektoro. Vespere la parolado okazis sub la auspicioj de la oficiala komerca Konstantaro kaj de la privata Societo de komercaj interesoj. Ĉeestis proksimume 400 personoj. S-ro Durcommun Prez. de nia Esp. grupo klarigis, ke la parolado estas organizita dankal U. E. A. pri kin li donis kelkajn utilajn informojn. Varma aplaŭdo. S-ro Humbertet bonege tradukis la paroladon, kin certe estis la plej bona propagando iaman farita en nia regiono. — T. R.

En *Nancy* (Franc.) 19 jan., 250 personoj ; en *Esslingen* (Germ.) 23 jan. antaŭ 200 personoj ; en *Stuttgart*, dufoje, antaŭ 850 personoj entute ; en *Wiesbaden*, 24 jan., 400 ĉeestantoj ; en *Worms*, 24 jan., dufoje, kun sume 800 aŭskultantoj ; en *Aachen*, 5 febr. en Kurhaŭs, 150 personoj.

Regionaj Esperantiaj kunvenoj. — *Trieste.* — La kunveno okazis la 12 jan. Post la raporto de la Delegito, aprobita, la kunveno alprenis la rezolucion, kin oni trovos en la rubriko « Organiza demando ». Ĝi ankaŭ decidis eldoni gvidolibron kaj gvidlibron de Trieste.

Dresden. — La kunveno okazis la 28 jan. en Stadtkafe. Ĝi komencis per la distrikta kunveno de Saksujo, ĉe kin ĉeestis Del. el diversaj saksaj urboj. La Distrikta Delegito raportis pri sia agado kaj la stato de U. E. A. en Saksujo ; li komencos specialajn klopodojn por elektigi Del en la urboj, kie U. E. A. ne estas ankoraŭ reprezentata. Post diversaj diskutoj, la ĉeestantoj esprimis al la estraro de U. E. A. sian dankon pro la celkonscia laboro de U. E. A.

Cape-Town. — Okazis la 6 de dec. 1911. Post la raporto de la Del. kaj diskutato, oni akceptis unuanime : 1^o Ke la membraro de U. E. A. kunvenu ĉiumonate, en centra loko, por interparolado ; 2^o Ke estu permesate inviti al la kunvenoj ne-esp-ianojn por ke ili ek konu U. E. A. Per vodonado S-ro Clark estis elektata Del, kaj S-ro Hayhow Videtel. La Del. poste starigis la necesajn konsulojn kaj tri Subdel.

Peterburgo. — La kunveno okazis la 31 jan. La Del. konsultis la rimarkindan plimultiĝon de la Esp-ianoj en Peterburgo ; la necesaj konsuloj estis elektataj ; gvidolibroj estas en preparo. S-ro Lorenzon raportis pri la vizito de fremduloj kaj speciale la vizito de S-ro H. Bolingbroke Mudie kun ses samlandanoj. La Del. rememorigis pri la Kongreso de U. E. A. kaj ĝiaj deziresprimoj. Post la raporto pri la regiona kaso kaj diversaj rimarkoj, la kunveno estis finata.

OKAZONTAJ KUNVENOJ

Esperantista Kalendaro

Aprilo (13-14). — Kongreso de la S. F. P. E., kongreso de la Esp. Federacio de la Pariza Regiono en *Parizo*.

Majo (26-28). — Kvina kongreso de Brita Esperanto-Asocio en *Portrush*.

Majo (26-28). — Kvara kongreso de Danaj Esperantistoj en *Vejle*.

Julio (27-31). — Kongreso de Germana Esperanto-Asocio en *Danzig-Zoppot*.

Aŭgusto. — Tria internacia katolika kongreso en *Budapeŝto*.

Aŭgusto (14-18). — Oka kongreso de Esperanto en *Krakovo*.

Aŭgusto (14-18). — Tria kongreso de U. E. A. en *Krakovo*.

Aŭgusto. — Unua hungarlanda kongreso Esperantista en *Budapest*.

DIVERSAĴOJ

* *Esperanto-Martiroj en Ĥinjo.* — Nia Del. en Ŝanghai skribas al ni la jenan leteron :

... Dankal la graveco de U. E. A. kaj helpo de kelkaj samideanoj de ĉi tiu ĉi regiono nia afero progresis tiel, ke mi povis varbi kelkajn Esp-ianojn en Ŝanghai kaj alioke. Lastajn monatojn revolucio okazis en tuta Ĥinjo. Tio nature ne havas rilaton kun nia afero, se ne per tio ke komunikadoj per ĝi prokrestitiĝis. Sed, malte ille ! la jeno okazis al niaj kolegoj : Miaj energiaj helpantoj estis S-ro M. Vu, societestro en Mukden kaj S-ro Soong, societestro en Changchowfu, tre laboremaj samideanoj. La 15-an de decembro S-ro Soong estis mortigata de iu nekonato. Sed ĉiuj unuvocite diris, ke pri tio estas kulpa la tiera urbestro, kin malkaŝe diris : « La Esperanto estas kaŭzonta revolucion ». Pife, S-ro Vu havas saman dangeron. La urbestro volis aresti lin, dirante, ke li estas revoluciano, ĉar li adoras Tolsioj kun Esperanto ! S-ro Vu sin kaŝis en nekonata loko kaj mi de longe ne povas kun li korespondi... Mi esperas, ke iom post iom ni estos sur pli feliĉa vojo....

* *S. f. p. E.* — Laŭ lasta statistiko (1 Jan. 1912), la franca societo por la propagando de Esperanto enhavas 10 federaciojn, 167 grupojn, el kiuj 18 sendependaj, kaj 8.385 membrarojn.

* *B. E. A.* — Nia Prezidanto, S-ro H. Bolingbroke Mudie fariĝis prezidanto de la *British Esperanto-Association*, anstataŭ K-to J. Pollen, kin post sep jaroj de prezidanteco kaj senlaca laborado por Esperanto ne nur en Britujo, sed en la Britaj Kolonioj, rezignis sian oficon, kompreneble konservonte al nia movado sian apogon kaj kunlaboron.

TRA LA GAZETARO

* *Le Monde Esperantiste* (Jan. 1912).

Sub titolo *Esperanto ĉe la Laboristoj* (A. Fréchas) :

«.... Se iafoje interfratiĝo regos en la mondo, ĝi estos ŝuldira al plena edukado de la popoloj kaj ne nur simple al instruado de ia ajna artefarita lingvo ; ĉar, se Esperanto havas la povon alproksimigi la estajojn kaj helpi al ili pli bone interkompreni unu la alian, ĝi ne havas tiun ŝanĝi iliajn karakteron kaj temperamenton. Ĝi ankaŭ ne havas la povon forigi de inter la homoj la malamojn, kiuj ilia dividas, la pasiojn kaj malvirojn pro kiuj ili suferas kaj ĉiujn tiujn ĉi anstataŭigi per virtoj. Do, se morgaŭ ĉiuj popoloj de la tero konus Esperanton, la bataloj inter nacioj tamen ne estus solvitaj. La edukado valoro, kin oni povas eliri el la kono de tiu internacia lingvo estas verdire reflektita kaj ĝi estas nepriatentinda ; la lernado de Esperanto havas nur efikon kunhelpeman en la edukado de la popoloj, sed estas eraro ĝin konsideri kiel solvon... »

* *Verda Standardo* (Jan. 1912), oficiala organo de la Hungarlanda Esp. Societo, havas de nun S-ron P. Robicesek kiel

redaktoron, anstataŭ S-ro de Marich. La gazeto anoncas, ke tre vigla estas nun la Esp. movado en Hungarlando; Esp. Kongreso okazos en Budapest dum somero.

.. *Itala Esperantisto* (Dec. 1911), anoncas kontentigajn progresojn de nia movado en Italio. La Itala Esp.-Asocio baldaŭ kalkulos nŭl membrojn.

.. *La Kultur* estas nomo de nova gazeto de bohema laboristaro Ĥsp. en Aŭstrio, redaktata ĉeĥe kaj Esperante. Ĝia unua celo estas « la praktika uzo de Esperanto en servoj de internacia socialismo ».

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO

Statistiko.

Jen la movado de la korespondantoj ĉe la C. O. de U. E. A., dum la monato januaro.

Ricevitaj	Mandatoj	Forsenditaj
1.536	327	1.407

Tuta sumo : 3.340 (sen la jarlibroj). Antaŭa monato : 2.938. Antaŭa jaro (sama monato) : 3.232.

LA DIREKTORO.

Financoj.

Kontoliro de U. E. A. de Januaro 1912

<i>Debito</i>	Sm.	<i>Kredito</i>	Sm.
Oficejo kaj Materialo	107 32	Kotizaĵoj	518 85
Salajtoj	162 46	Dumvivaj membroj	20 00
Korespondado	73 64	Subtenantoj	49 50
Presado de la Jarlibro	684 84	Aprobantoj	1 46
Presajtoj	138 26	Esp. Entreprenoj	37 11
Afranko de Jarlibroj	264 83	Anoncoj	45 00
Diversaj kontoj	6 30	Saldo	765 73
	<u>1.437 65</u>		<u>1.437 65</u>

Debito	Fakaj Kotizaĵoj	Kredito
Sm.	Sm.	Sm.
Laborista Fakoj	33 08 Interŝanĝa Fakoj	49 52
Virina Fakoj	33 84 Laborista Fakoj	3 50
	66 92 Virina Fakoj	9 00
	Saldo	34 90
		66 92

Subtenantaj Membroj (4-a. listo) :

121. *F. Tierack*, Sao-Leopoldo; 122. *Sanchez*, Valencia; 123. *A. Mello*, Rio de Janeiro; 124. *J. Quetoz*, Rio de Janeiro; 125. *G. Linziger*, Duisburg; 126. *L. Fuhrmann*, Düsseldorf; 127. *W. Schnitz*, Altenessen; 128. *J. Martin*, Nice; 129. *P. Proctor*, Brisbane; 130. *R. Lorenson*, Peterburgo; 131. *Le Duitgou*, Cherbourg; 132. *F. Rohden*, Essen-Ruhr; 133. *Th. Christen*, Bern; 134. *H. Grieman*, Rostov-Don; 135. *A. Krzyżewski*, Zabor; 135. *Tiard*, Paris; 137. *J. Wilson*, Hillesdon; 138. *N. Ieano-Bruno*, Petersburg; 139. *J. Garcin*, Castebiane; 140. *E. Webber*, Invercargill; 141. *R. Mackinnon*, Invercargill; 142. *A. Stupin*, Moskva; 143. *Richardson*, Bruselo; 144. *F. Mathieux*, Bruselo.

Kontrolado de la Kalkuloj.

La subskribintoj, Rousseau Théophile, Delegito de U. E. A. en Dijon, kaj Eyrot, J.-M., Delegito de U. E. A. en Chambéry, kontrolinte la kalkulojn de Universala Esperanto Asocio en ĝia sidejo, 10, rue de la Bourse, Genève, certigas, ke ili trovis ĉion en ordo kaj konforma je la kalkulibroj.

Genève, la 28-an de decembro 1911,

Subskribis : Th. ROUSSEAU, J.-M. EYROT.

Novaj Del. Vic. kaj Subdel.

CASTELLANE (Francujo, Basses-Alpes). — D. : Joseph Garcin, negocisto-urpkonsilisto, Grande-Rue.

CHATELON-SOUS-BAGNEUX (Francujo, Seine). — D. : Henri Nonin, 20, Avenue de Paris.

DÜRRENNERSDORF (Germanujo, Saksujo). — D. : Gerhard Jachne, ingeniiero.

EMAU (Germanujo, Saksujo). — D. : Paul Reimann, skribisto, Ebersbacher Seite 294.

HABANA (Antiloj, Cuba). — VD. : J. M. de Villa, Lonja del Comercio 423 (poŝtadr. : Apartado 1.357).

LUZERN (Svisujo). — D. : F-ino Luisa Erasmi, Sempachertasse, 19.

OSWIECIM II (Aŭstrio, Galicio). — D. : F-ino Maria Malinowska, Spa (Belgiujo, Liège). — D. : S-ino Steinhuse-Engel, 18, Bd des Anglais, VU. : S-ro Grosjean, rue du Progrès.

VERDAU (Germanujo, Saksujo). — D. : Franz Salzbrenner, frakulturisto Seelingstadt b./Verdau.

Ŝanĝoj.

CHAMEROT (Belgiujo, Hainaut). — D. : Lambert Delvaux, prof. en la reĝa Ateeno, 23, Boul. Joseph II. — ЕСКРИЗЕН (Nederland, Nord Hollande). — D. : Andries Rykentzon, Semeynstr, 66. — ERLANGEN (Germanujo, Bavarujo). — D. : Hermann Barnack, stud., phil. Süd. Stadmauerstr., 4. — HUYERSUM (Nederland, Hilversum). — D. : J.-F.-E. von Roemer, Villa « Gooiheim », Bushuweg-midweg, 14. — KAIRŌ (Egiptujo). — VD. : L. Cirilo Atkins, regist. oficisto, Sharia Kelaui, 7, Avenue Choubra. — KEELN A./Rh. (Germanujo, Rheinland). — VD. : Aug. Junker, Hohestr, 26. — NOWO-MINSK (Rusujo, Polujo). — D. : Joselo Chankowski, ŝtatoficisto. — PENIEUX (Francujo, Dordogne). — André Jubert, 34, Cours Fecelon. — PORTH AMBOY (Usono, N. J.). — SD. : H. W. Fisher, ingeniiero, Stand. Und. Cable Co. — RIZAN (Rusujo). — D. : Mihail Cimbalisty, Sobornaĵa, 246. — SAINT-GILES (Belgiujo, Bruxelles). — SD. : S-ro Bonabo, monŝangisto, 32, rue Gustave Defuel. — TROYES (Francujo, Aubes). — D. : S-ro Deharry, rue Gallet, 16, St-Sarine. — YOUNGSTOWN (Usono, Ohio). — SD. : K. C. Kerr, kontisto, Republic Building. — ZMERINKA (Rusujo, Podolsk gub.). — D. : G. Gebrmann.

Novaj Esperantiaj Entreprenoj.

PRIEN (Germanujo). — Esperanto-Klubo Prien. — LONDON (Anglujo). — Thos. Cook kaj Filo, Turist-Agentejo, Ludgate Circus, London.

Korektoj.

CHAMEROT (Belgiujo). — Grupo Esperantista. Kunveno : merkredo je la 8-a vespere. — GENOVA (Italujo). — Genova Esperanto Unuiĝo. Sidejo : Salita Pollaino 13-4, Genova M. 120. — GENOVA (Italujo). — Itala Esperanto Asocio. Adr. : Salita Pollaino 13-4. — LONDON (Anglujo). — Emanuel Esp. Klubo. S. : E. A. Allsop, 27-a Burnbury Rd., Ballham S. W. Ejo. : L. C. C. Lennjo, 265-a Camberwell Rd. S. E.

ORGANIZA DEMANDO

La Esperantia kunveno en Trieste alprenis la jenan rezolucion :

La Esperantianoj de Trieste, konsiderante ke du internaciaj asocioj de esperantistoj estus tre dangeŝaj por la disvolvigo de Esperantismo mem, opinias, ke devas ekzisti nur unu, en kiu ĉiuj Esperantistoj estu enskribitaj kaj ke la sola asocio por tia celo estas U. E. A., kiu jam donis multnombrajn pruvojn pri sia taŭgeco.

La kunveno de la Nottinghamaj Esperantistoj akceptis la jenan deziresprimon :

La Nottinghamaj Esperantistoj, post aŭskulto de parolado de S-ro J. Hodges, ĵus reveninta el Ĝenevo, opinias, ke U. E. A. estas la plej bona organizaĵo nun ekzistanta, sur kies bazo povas sin organizi plej efektive la tuta Esperantistaro.

Esperantia Parolejo

Paroladoj Parrish

Kiel organizi la Parrish' paroladon, se la grupoj timas defici-ton ?... Laŭ konsilo de S-ro Parrish mi proponis la aranĝadon ĉe ni al kinematografio kaj kun la albla permeso de ĝia direktoro mi povas publikigi la jenan ateston :

Atesto :

La subskribinto, Direktoro de la Kinematografio « Central », en Chaux-de-Fonds volonte deklaras, ke laŭ propono ricevita de S-ro Th. Romigier, Delegito de U. E. A. en Le Locle, li entreprenis tute je siaj elspezoj la organizadon de la lamblida parolado de S-ro D. E. Parrish pri Kalifornio en la Chaux-de-Fonds kaj Le Locle. Li ankau atestas, ke la rezultato estis neatendite bona. La parolado devis esti farata en Chaux-de-Fonds la 17-an de Jan. 1912 trifoje postagmeze por la infanoj (proksimume 1.500) kaj vespere al plenkreskaj personoj (200), kaj en Le Locle en la urba teatro la 18-an de Jan. dufoje al la infanoj (300) kaj vespere al ĝenerala publiko (400).

La Chaux-de-Fonds, 24-1-12.

Por la « Cinema Central »

La Direktoro : Emilie Wolf.

Tiu atesto eble helpos al kelkaj Delegitoj organizi la tre interesan paroladon en ilia urbo.

Th. Romigier (Del. Le Locle).

Atentigo

Oni petas nin presigi la suban informon :

La Esperantistoj kaj Esperantianoj estas atentigataj pri ĉi rusa samideano, kiu vojaĝas tra Francujo, an eble aliloke, ke li agas malhoneste, kie li pasas. Li forgesas pagi ŝuldojn, kiujn li faras ĉu ĉe gastoj, ĉu ĉe samideanoj, ĉu ĉe komercistoj. Tiu persono havas nur tri fingrojn ĉe la dekstra mano. Oni atentu !

Oni dankas !

Sinjoro Redaktoro ! Permesu al mi per via gazeto tulkore danki ĉiujn bonajn esperantiajn monofarantojn, kiuj sendas per mi siajn donacojn por la malfelicitaj malsatuloj de nia regiono, dank'al mia alvoko en la N-o 113 de « Es-to ». Al ĉiuj monofarantoj mi sendas la oficialan kvitancon. La boneco de l'alilanduloj tre kortuŝas nin, pruvante ke Esperanto vere proksimigas la homojn ; samtempe tio faras efektan propagadon al via ideo. Se estas konate, ke la ĉiutaga nutraĵo de ĉiu malsatulo kostas nur 5 spd., do ĉiu sendanto povas facile kalkuli kion da homoj li savas.

Veterinaro N. Foos,

Rusujo, Ufa, Delegito.

* Al la Dijon'aj (Francujo, Burĝonoj) esperantianoj, kiuj tiel atable kaj sincere donis al mi sian helpon en la unuaj tagoj de instaligo en tiu urbo, kaj kiuj poste tiel gastame kaj amike min akceptadis, — mi esprimas tie ĉi, oficiale, mian plenkoran dankon.

Al miaj provizoraj ĝeneralitoj mi samtempe deziras sukcesan laboron super nia internacia lingvo kaj enpenisĝon en ĝian internan ideon. Samideanan saluton al Francujo !

M. Kaŭs,

Leipzig, en januaro 1912.

Del. de U. E. A., reg. Kalis.

* S-ro Ch. Cerni, kompozisto el Parizo, kore dankas la Del. Carlos kaj Blaise, per kiuj li trovis laboron ĉe grava firmo Potter kaj Ko, en Londono.

Esperantia Vivo

Honorigo. — Nia sindonema Pariza Del., S-ro Ĝenemont, ricevis de la Supera Konsilantaro de la Pariz. Belarta Lernejo la premion Fouet (sekcio arkitektura) valoro 300 Sm. Niajn gratulojn al nia fervora samasocio pro tiu merita sukceso.

Mortoj. — Ni kun bedaŭro eksciis la morton de S-ino Louis Warrnier, patrino de nia antaŭa Del., en Parizo, S-ro G. Warrnier.

* La 23 de januaro mortis la patrino de Don Giacomo Mezzini, nia sindona Delegito en Campi di Bibbiena.

Ambaŭ asocioj akceptu niajn samideanajn kondolencojn.

Alvokoj

Aŭtoroj !

Samideano S. C. Soong estas mortigita. Nia afero nun devas ekdormi, ĉar neniu volas sin okupi pri nia movado. Ne povante tion plibonigi, ni nin turnas al gepoejoj.

Ĝesinjoroj ! Bonvolu, se tio vin interesas, verki versaĵeton pri la malfelica mortigito, kaj ĝin sendi al S-ro K. Ĉ. Ŝan (Del.), 683 Myburgh Rd, Shanghai (Ĥinujo). Li kolektos tiun bukledon kaj ĝin publikigos por honori la mortinton kaj admoni la ankoraŭ vivantajn.

Se la ricevotaj verkoj vere utilis kaj progresigos nian movadon, ni neniam forgesos tiun helpon ! Antaŭdankas.

K. Ĉ. Ŝan.

Kristanaj Junulaj Unuiĝoj

Ĉiuj Esperantistoj de la mondo estas insiste petataj, atable helpi je la tuta kolekto de komplota statistiko pri la disvastiĝo de la Esperanta afero inter la « Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj » (Angle : « Y. M. C. A. », Germane : « C. V. J. M. », France « U. C. J. G. »). Oni sendu respondon al jenaj demandoj :

1. La adreso de la « Krist. Unuiĝo de Junaj Viroj ».
2. Ĉu tiu ĉi unuiĝo iam por siaj membroj aranĝis paroladon pri Esperanto ?
3. Ĉu la unuiĝo jam aranĝis Esperantan kurson ?
4. Kion da membroj entute studis Esperanton ?

Al S-ro Paul Hübsen,

Dellbrück ap. Kohn (Germanujo).

Mendu !

* Mi tre petas ĉiujn samideanojn peti de l'Kürverein la esp. gvidlibron tra Reichenhall (German.) ĉar ankoraŭ troviĝas en ĝia komitato skepikuloj rilate nia afero.

* Al ĉiuj *policeanoj* mi konsilas skribi al la « Schutzmannschaft ». Bad Reichenhall kaj al la « Gendarmarie Station » en la sama urbo petante iaĵn in via formoĵa pri policej aferoj, ktp. (*Esperante*). — M.

INDEX ROLOGIO

D-RO GABRIELO ROBIN

Kun la koro premata je plej profunda dojoro mi ekscitis la perdon de ia el la plej fervoraj apostoloj de nia lingvo, D-ro Gabrielo Robin, la sentata pioniro kaj enkondukanto de Esperanto en Rumanujo. Pro nefrito, post nunmonata malsano, la 26-an de decembro li mortis. Al multaj el la Dresdenaj kaj Antverpenaj kongresanoj, kiuj havis la okazon lia koni, tia ĉi doloriga sciigo ŝajnas certe nekredebla. Morti, tia forta kaj simpatia viro kaj ankoraŭ tre juna ! Ĉu eble ? Tamen, ho ve ! Tio jam okazis ! Kiel familjestro li postlastis nekonsoleblan vidvicon kaj du infanetojn, Eugeno kaj Nikolao, ĉiuj esperantistoj. Kiel esperantisto li postlastis la rumanan samideanaron kiu lia trezore ŝatis kaj respektis. Vere lia agneceto, honesteco kaj sincereco estis tiaj plej karakterizaj ecoj, kaj pro tio en ĉiuj sociaj rondoj li estis ĉiam ŝatata.

Skribi biografion de tia ĉi viro, mi sentas min tre malinda. Tamen mi volas nur fari mian devon kaj montri al la samideanaro ionon nur el lia riĉa je bono vivo.

Naskiĝinta la 24-an de marto 1869 en la provinca urbo Aleksandria li mortis je preskaŭ 43-jara aĝo. Devenante el tre matricia familio (lia patro estis nur malgranda ĉarantisto) li sukcesis per si mem atingi bonan situacion. La unuajn siajn studojn li faris en sia naska urbo kaj daŭrigis ilin en Bukureŝto.

Jam de kiam li estis apenaŭ 15 jara li povis mem subtenigi por fini la studadojn. Fininte la liceon li sekvis la Bukureŝtan universitaton kie li sin dediĉis al la medicino, bakteriologia fakto. Estinte ankaŭ multajn jarojn kiel asistanto en la universitata laboratorio, li fariĝis la plej lerta rumana bakteriologia doktoro. Li posedis la plej grandan kaj perfektan tiufakan laboratorion kaj ĉefkuracisto je granda ŝtata hospitalo kaj de privataj malsanistuloj. Tia li estis kiel scienculo. Kiel homo li apartenis al la plej demokratiaj personoj. Larĝa kaj grandanima spirito li ĉiam estis preta kuraĝigi ĉian demokratian kaj idealan ideon.

Kiel esperantisto, li ne apartenis al la plej mahovaj sed al la plej sinceraj kaj fervoraj. Li esperantiĝis en 1906 okaze de ia vojaĝo en okcidento. De tiam li restis vera pioniro de Esperanto. Tuj post lia esperantiĝo li kuraĝis komenci la propagandon en Rumanujo. Dum 1907 li fondis la R. E. S., kies prezidanto li restis ĝis la morto. Por tiu granda kaj nobla ideo al kiu li tute sin dediĉis li oferis multon, monon, tempon kaj sanon. Dum 1908 li partoprenis la bulgaran esperantistikan kongreson en Ŝumen. Tiam li akceptis la taskon organizi esp., kongreson en Rumanujo; tiun taskon li plenumis mirinde. Vere post sentesa laborado tage kaj nokte dum 1909 li organizis la unuan esp., kongreson en Rumanujo kiu per ĉesio de bulgaraj, serbaj samideanoj estis preskaŭ internacia kongreso, kies entuziasmo superis ĉiujn atendojn (Multe pli ol eĉ veraj internaciaj ekz., la sepan kiam mi feliĉe ĉeestis). Tiam la komuna agado kun la bulgaroj multe plifortigis.

Li tradukis la esp., fundamenteon, unuajn lecionojn de Th. Carl, unu horo de Esperanto; poste li fondis la revuon *Rumana Esperantisto*, estinta oficiala organo de R. E. S., verkis *Manual de Esperanto* en dek lecionoj kaj ĝian ŝlosilon, k. a.

Dum la lasta jaro, okaze de la esp., bulgara-rumana kongreso en Sofio, li fondis la ŝatan revuon *Danubo* komunan organon de bulgaroj kaj rumanoj kies direktoro li estis ĝis fino de sia vivo, kronigante do gravan sukceson de Esperanto, ĉar per ĝi estas nun konligitaj du tute malsamdevnaj kaj malsamlingvaj popoloj.

En la lasta jaro, anstataŭ iri en saŭigon li preferis vojaĝi al kongreso por renkontiĝi kun multaj samideanoj amikoj kiujn li koids nur laŭdome. Tio estis por li granda ĝojo.

Post lia reveno, li havis grandan programon por plenumi sur la esperanta kampo. La kruela morto, kiu lin forrabis inter ni, malhelpis lin plenumi sian dezirojn.

Ĉiuj kiuj lin konis, vidis en li viron kaj per Esperanto nun li

mem kreis al si monumenton kaj gloran nomon por la bono de Rhomaro. Piorante lin tulkore mi nur diras : denata li estu, eterna estu lia memoro !

Em. J. Nicorau (Del. Bukareŝto).

S. C. SOONG

Ni kun larvoj sciigas la legantojn pri la malhelita okazinta al nia laborema Hima Esperantiano, S-ro Prof. S. C. Soong, la Societestro de Changchowfu. La 15-an de decembro 1911 li estis mortigata sur la vojo vespere, pro nekonata kaŭzo ; la mortiginto ankaŭ estas nekonata ĝis nun. Sed ĉiuj scias, ke la mortiginto certe estas sendita de Purbestro aŭ de lia subulo. Ĉar tiam la revolucio ĵus okazis en la tuta Ĥinujo, kaj la urbestro ne konis Esperanton, ĉiam dirante senkaŝe : « Esperanto eble kaŭzos revolucion ! » Do S-ro Soong mortis pro nia lingvo ! ankaŭ pro nia afero de U. E. A. Li fondis la Societon kun 36 anoj.

Pro lia morto la movado en Suda-Ĥinujo perdis bonan subnanton. Legantoj kompitu, pro lia eksterordinara kortuŝ inda morto.

K. Ĉ. Šan (Del. Shanghai).

A. VAN-DER BIEST

« IN MEMORIAM »

Se la tuta Esperantistaro perdis, per la morto de la Prezidanto de la Sepa Kongreso, eminentulon, kies nomo estas konata kaj estimata en multaj landoj, mi persone perdis karan kaj amatan amikon. Pro tio pemisu al mi diri kelkajn vortojn en ĵurnalo tre ŝatata de li, pri la infima karaktero de mia neniam forgesbla amiko.

Amatus Van der Biest estis vera Esperantisto, lia tuta animo estis plena je la infima ideo de Esperantismo : la universala frateco inter la tuta homaro. Lia fido en Esperanto estis senlima. Al li oni povus doni la laŭdon donitan iam al Romana Estro : « Li neniam malesperis pri la Respubliko ». Dum tiuj maltrankvilaj tagoj kiam kelkaj, kiuj ŝajnis la apostoloj de nia movado, batalis sekrete kontraŭ ĝi, li neniam dubis pri la fina venko.

Ofte li diris al mi : « Ne timu, ne li, ne mi, ne iu, povus nun detrui Esperanton. Ni povas, aŭ helpi tiun homaman movadon, kaj meriti la estontan bonfamon, aŭ esti perdituloj, kaj ĝajni la eternan neĉestimon de niaj postuloj, sed la Estoneco estas al Esperanto ». Kara Amatus, Adiaŭ, aŭ pli vole ĝis la revido. Pri tiuj grandaj temoj vi kaj mi plene konsentis, la morto ne longe apartigos nin, baldot mi revidos unu la alian.

Austin Richardson,

Vice-Prezidanto de la B. L. E.

Jen kelkaj biografaj notoj pri nia bedaŭrata samideano : Amatus Van der Biest naskiĝis je 1850. Kiel sia patro li dediĉis sian vivon al la instruado de la junuloj. Multaj el liaj lernantoj okupas nun altirantajn situaciojn kaj ĉiuj konservas pri sia iama pedagogo la plej altan estimon. Amatus havis dum sia vivo noblajn homamajn idealojn ; do, ne estas mirinde, se Esperanto kaj precipe Esperantismo kaptis lin tuj de la unua momento, kiam en 1905 lia filo, nia simpatia Esperantoverkisto, D-ro Van der Biest prezentis la elpensojn de D-ro Zamenhof al lia studado. Li sin donis al Esperanto tutanime kaj ĉeestis ĉiujn kongresojn, ekster la Sesa. En Belgio li estis ne nur fervora apostolo, sed oni povus diri la Savinto de la Esperanta movado. La tiama Prezidanto de la Belga ligo esperis ĝajni al la Ida skismo la tutan belgan Esperantistaron. Por havi voĉdonon tion celantan, li kunvokis en Bruselon ĝeneralan kunvenon de ĉiuj belgaj Delegitoj. Sed dank'al la energia agado de de Van der Biest, dank'al la nobla fideleco de le Bruga grupo, la kunveno estis nepra venko de Esperanto, kiu de tiam mirinde progresis en Belgio.

A. Richardson.

Sekve de la artikolo de nia kunlaboranto Verto en N-o 112 (p. 326), S-roj L. Couturat kaj L. de Beaufront, cititaj en ĝi, sendis al ni la jenan korekton (teksto en Esperanto) :

Viaj « spritaj kaj superlogikaj » citajoj (N-o 112, p. 326, kol. 2) ne estas plenaj. La unua ne estas de Couturat sola, sed de Couturat kaj Leau, en *Histoire de la Langue universelle*, verkita en 1903, do antaŭ la starigo de la Fundamento, kaj kiam ni deniel konis la de Zamenhof en 1894 proponitajn reformojn. Ĉi sekvas kritikon, kiu montris klare la ĉefajn difektojn de Esp. Tiuj difektoj nur kreskis poste per l' « uzado », kaj ĝis ne kurac-blaŭ pro la *Fundamento*. Nur al Esp., libere korektebla kaj evoluepova povis aplikigi antaŭ la frazo de Beaufront : do ĝi tategas efektive por Esp., plihonigita, t. e. Ido. Cetere, ĉiuj personaj opinioj devis malaperi antaŭ (kaj post) la unuvoĉaj decidoj de la *Delegacio* (24 oktobro 1907), kiuj forĵetis Esp. primitivan kaj alprenis Esp. reformitan laŭ la projekto Ido. Tiuj de la plej eminentaj de Esp. ĉefoj (1) voĉdonitaj decidoj rezultis de longaj diskutoj kaj reciprokaj cetoj : ili estis kverzaj kontraŭte, cetere tute konforme al la de la Majstro esprimitaj deziroj (vid., *Zamenhof's Geheimnis*, en *Idamo*, julio 1911). Kiu rompis la kontrakteton, kaj deklaracis la militon (18 januaro 1908) ? Ni ankoraŭ atendas, ke viaj ĉefoj konformigu siajn agojn al siaj tiamaj promesoj kaj voĉdonoj. Nur tiel oni povos restarigi l'unuecon, celon de la *Delegacio*, ne per sielema plaĉinto de Ido, sed per lojala akcepto de la necesaj, nun en Ido elektivigitaj reformoj. Nur al Ido aplikigas la de vi cititaj frazoj ; nur Ido povas esti aprobatata de ĉiuj senpartiaj kompetentuloj kaj akceptata de la registaroj. N. B. : Ĉio tio ĉi estis multe pli klara en Ido, sed oni timas, ne malprave, montri al la fideluloj eĉ unu linion de la vera lingvo internacia (2).

L. COUTURAT.

Sekve de nia kongresa raporto (N-o 108), ni ricevis la jenan leteron :

Dijon, la 14-an de januaro 1912.

Mi ricevis de S-ro Cart, okaze de la baldaŭa publikigo de ĝenerala raporto pri la sepa kongreso, komunikon de la N-o 8-9 (aŭgusto-septembro 1911) de Lingvo Internacia, el kiu tiu raporto estas eliritita. Samtempe oni atentigis mia pri la eliraĵo de via gazeto *Esperanto*, kiu troviĝas tie reproduktita ĉe paĝoj 361 kaj 362.

